

Jara abono 1973

20,- GM



PILO-PRESS

Internacia Inform servo

N-ro 38/72 - 28 nov 1972
Aperas ĉiusemajne

=====
P&k. Ludwig Pickel
D-85 Nürnberg
Nürnberg 81956-851
=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

=====
Britaj parlamentanoj favoras Esperanton

Londono (EPS-IF) Enketo farita de anoj de Brita Esperantista Asocio montras, ke el 100 parlamentanoj demanditaj, 45 favoras Esperanton kiel la Internacian Lingvon. Dekkvar aŭ kontraŭis aŭ opiniis, ke la angla lingvo devas esti la internacia lingvo; dektri ne kontraŭis, kaj dudek ok ne indikis opinion. Inter tiuj kiuj favoris estis s-ro George Thomson, antaŭe ministro kun aparta respondeco pri la Komuna Merkato. Ok el la parlamentanoj jam studis Esperanton, inkluzive de Harold Wilson, la antaŭa ĉefministro.



„Französisch, Deutsch und Italienisch ist leicht, aber ich sehe unter euch niemanden, der bis 1980 neun Sprachen beherrscht.“
Zeichnung: JAK

Pri la karikatur: Horaro por Eŭropo

Teksto: La franca, germana kaj itala estas facilaj, sed mi ne vidas iun inter vi, kiu regos naŭ lingvojn ĝis 1980. (El Bonner Rundschau, 6.11.72)

lingvoj de la nunaj ŝtatoj estas la oficialaj lingvoj de la Komunumo." Tio estas spite al la fakto, ke la Komitato pri Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj de la Konsilantaro de Eŭropo mem asertis: "Sed kiam homoj kiuj uzas diversajn lingvojn* pro iu komuna intereso, ni scias el nia propra sperto, ke ili ofte renkontas gravan barilon rilate al la lingvo."

*kunvenas

KKS Nevan en Beogrado

Beogrado (MG) En la unua duono de la monato novembro s-ro Mikulaŝ Nevan, la KKS, restadis en Beogrado por antaŭenigi la preparojn por la 58-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta sekvontjare en Beogrado.

Granda nombro de parlamentanoj bedaŭris, ke Esperanto estis neglektata kaj en la lernejoj kaj ĉe radio kaj televido. Tamen, la decido starigi kursojn estas en la respondeco de la koncernaj sendependaj instancoj.

Unu surpriza rezulto estis ke s-ro Geoffrey Ripon, la ministro kun respondeco por la Komuna Merkato en la nuna registaro, respondis, ke oni spertis nenian bezonon por instigi la uzadon de Esperanto kiel internacia lingvo en la funkciado de la Komunumo. Li klarigis: "La kvar ĉefaj

GEA-estrarkunsido

Lüdenscheid (PP) La 25 kaj 26 nov 1972 okazis en la vest-falia urbo Lüdenscheid kunsido de la GEA-estraro. Dum pli ol 12-hora intensa laborado la estraro traktis la estontan agadon de GEA kaj speciale de la estraro mem. Oni faris bilancon de la disponeblaj laborfortoj kaj diskutis pri la plenumotaj taskoj kaj pri la estraraj funkcioj. Sen eniri en la detalojn, oni povas konstati, ke tiu estrarkunsido signalas la komenciĝon de pozitiva ŝanĝo en la estonta agado, kies perspektivo kaj sukcesa realigo dependas de la aktiva samvalora kunlaborado de la unuopa estrarano kaj de la pozitiva sinteno kaj financa subteno fare de la unuopaj GEA-membroj.

La estraro diskutis la preparojn por la Ĝenerala Esperanto-Kongreso en Luksemburgo 1973 kaj akceptis la provizoran programon kaj buĝeton, prezentitan de Hermann Weiss, estrarano pri kongresoj. Prezidanto Dr. Werner Bormann prezentis raporton pri la LKK-laboroj en Hamburgo por la UK 1974.

La kunsidon partoprenis ankaŭ la eldonanto kaj la redaktoro de Germana Esperanto-Rĉvuo.

La unuopaj partoprenantoj en la estrarkunsido venis el ĉiuj kvar direktoj ĉielaj, el la nordo, sudo kaj el la oriento kaj okcidento de FRG.

Esperantistaj bondeziroj al Willy Brandt

Vieno (PP) La Aŭstria Socialista Ligo Esperantista sendis al Federacia Kanceliero Willy Brandt germanlingvan gratuleteron, kies Esperanta traduko tekstas jene:

"Ankaŭ ni socialistaj esperantistoj de Aŭstrio volas esprimi nian ĝojon pri la granda balota venko, kiun gajnis la Socialdemokratia kaj Vi, estimata kamarado, speciale. Samtempe ni volas transdoni niajn bondezirojn por fruktdona laboro en la senco de demokratia socialismo.

Ni scias, ke vi ĉiam bonvole subtenis niajn strebadojn kaj la strebadojn de niaj amikoj en la federacia respubliko por doni realan bazon al la popola interkompreniĝo tiel necesan por la konservado de la monda paco per la akcelado de la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto, kaj ni esperas, ke Vi estonte tion povos fari pli intense kaj ankaŭ faros.

Hun socialista saluto por la Aŭstria Socialista
Ligo Esperantista
D-ro Leopold Grimme
2-a prezidanto"

Polaj memoraĵoj en Aŭstrio

29.11.72

Vieno (PR-PP) Prof. Beckmann parolos merkrede/en la Esperanto-elsendo de "Österreich Regional" (Wien, FÖ, Burgenland), kiu bedaŭrinde nur estas aŭdebla regione, je la 13,30 horo, pri la temo "Polaj memoraĵoj en Aŭstrio". Pri tiu elsendo felietonis jam marde, 28 nov 72, je la 16,30 h Mariusz Dastyk en la Esperanto-elsendo de Pola Radio. Al tiu felietono, kiu pozitive komentis tian prelegon en la Aŭstra Radio, dankŝuldas PILO-PRESS tiun informon. Jen ekzemplo de aktuala informado!

Esperanto en popolaj lernejoj

Romo (RAI-ades). La itala ministerio pri publika instruado organizas ĉiujare popolajn kursojn en la kadro de la tiel nomita "agado por edukigo de la plenkreskuloj". La diversaj provincaj studestroj estis komisiitaj, per dekreto, rajtigi Instancojn kaj Asociojn organizi kursojn por plenkreskuloj, surbaze de detalaj agad-planoj proponataj de la instancoj interesitaj.

La Esperanto-grupo en la urbo Trento, baziĝante sur tiu ministra dekreto, petis la rajtigon organizi oficialan kurson pri Esperanto por plenkreskuloj, en 5 diversaj lokoj de la koncerna provinco; pli precize, ĝi proponis "5 kursojn por diskonigo de la internacia lingvo-problemo, kun unuagrada instruado de la internacia lingvo Esperanto, kaj mallongaj skizoj de ĝia historio kaj literaturo", en la periodo 1-a de januaro - 30-a de junio 1972.

En la aldonita raporto, la Esperanto-grupo en Trento tiel skizis al la provinca studestro la programon de la kursoj: "Dum la kursoj oni prezentos kaj pridiskutos la problemon de la komunikado inter la popoloj en la pasinteco, en la nuntempo kaj en la estontaj perspektivoj. Oni klarigos la barojn al la disvastiĝo de la internacia lingvo Esperanto, jen objektivajn jen naciismajn, kaj la akran opozicion al ĝia plifirmiĝo flanke de kelkaj naciaj lingvoj, rekte interesitaj. Oni donos la unuajn gramatikajn elementojn de la lingvo Esperanto, tiel ke la lernanto povu ekvidi la facilecon de ĝia lernado kompare kun la naciaj lingvoj, kaj li ekkonu la lingvon en sufiĉa maniero por elementa interkompreniĝo. Dum postaj kursoj oni perfektigos la uzadon de la lingvo kaj la pliprofundigon de la problemo, ankaŭ konekse kun la diverspopola literaturo." La provinca studestro en Trento rajtigis unu el la proponitaj kursoj, kiu tiel ricevis oficialan agnoskon; la ŝtato ankaŭ repagis la elspezojn de la kurso.

Konekse kun la supre dirita situacio, estas aparte interesa la respondo, kiun la 24-an de oktobro 1972 la ĝenerala direktoro pri popola edukigo sendis al la itala Esperanto-Federacio, koncerne la leĝproponon por instruado de Esperanto en la italaj mezgradaj lernejoj. Jen ĝia laŭvorta traduko: "Ĉi tiu Direkcio priekzamenis la interesan materialon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, kaj ĝi opinias, ke la disvastiĝo de ĉi tiu internacia lingvo inter la lernantoj de mezgradaj lernejoj povus konduki al interesaj rezultoj. Koncerne, aparte, ĉi tiun Direkcion, oni rimarkigas ke, je la nuná stato de la reguloj kiuj koncernas la popolajn kursojn, oni ne povas enkonduki Esperanton, konsiderante, ke tiuj kursoj havas lernantaron ekstreme elastan, kaj direktiĝas al plenkreskuloj analfabetaj, aŭ al personoj, kiuj jam delonge forlasis la elementajn studojn."

La duboj de la ministeria direkcio koncernas, evidente, la eblecon enkonduki Esperanton kiel regulan studobjekton (kaj tio, efektive, aspektas neebla, ĝuste pro la kaŭzoj indikitaj), sed en kelkaj kazoj oni bonege povas instrui la internacian lingvon en la kadro de la popolaj lernejoj, kiel pravas citita ekzemplo de Trento. Ĉiukaze estas tro gravaj la principaj aprob-vortoj de la instruado de Esperanto, flanke de la menciita direkcio. (El Kuriero de Esperanto, Radio Romo, 19.11.72)

Zamenhof-festoj 1972

Zagrebo (MG) La 15-an de decembro, la Zamenhofan Tagon, festos ankaŭ ĉi-jare la esperantistoj en la tuta mondo. Dum tiuj festoj kolektiĝas kutime unuloke ankaŭ tiuj samideanoj kiuj dum la jaro ne vizitas regule societajn aŭ grupajn kunvenojn. La zagrebaj E-Societoj "Buĉe Borĵan", Studenta Esperanto-Flubo kaj Fervojista Esperanto-Societo interkonsentis prifesti la Zamenhofan Tagon en komuna solena aranĝo, dum kiu prezentigos per unuaktaĵoj la Drama Sekcio de SEK. Estos aranĝita ankaŭ la libro-merkato, konsiderante ke la Zamenhofa Tago estas jam tradicie la librotago.

Zamenhof-festoj okazos ankaŭ en Duisburg, 10.12.72, Hamburgo 15.12.72 kaj Munkeno, 17.12.72.

Ĝojigu vin mem kaj aktivigu la libro-merkaton de Esperanto.

Aĉetu minimume unu Esperanto-libron por la Zamenhofa Tago

Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, estas je via dispono!

Japana Esperantisto tradukas libron pri Kopernik

Varsovio (PR - M.D.) Japana eldonejo, kunlabore kun la pola agentejo "INTERPRESS" mendis en pollando tradukon de la libro pri Nikolao Kopernik de prof. Biskup el Toruń. La tradukon japan-lingven prizorgas japana esperantisto, loĝanta en Pollando, Teruo Matsumoto.

La semajno en la radio (PP)

Al unu homo ne ĉiam eblas aŭskulti dum unu semajno ĉiujn Esperanto-elsendojn. Tiel okazis al mi ĉi-semajne, parte pro vojaĝoj. Pro tio mi ĉi-semajne limigas min al la elsendoj de Pola Radio. - Apud agrikulturo kaj polaj spezoj en komerco la preparaj paroloj por la konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Helsinki estis la elstara temo en la ĉiumarda felietono "Pri kio oni parolas en Pollando". "La aŭtuna ĉielo fariĝas pli kaj pli klara", estis la optimisma konstato. Sed ankaŭ la rezulto de la balotoj en Bonn postefikis en la politika komentado. - El la leterkestoj evidentigis, ke pli kaj pli da aŭskultantoj da aŭskultantoj konsciiĝas pri la graveco de la Esperanto-elsendoj. En la lundo-matena Esperanto-ekspreso Jan Klinek felietonis pri la ĝisnunaj 4 numeroj de FORUMO kaj en intervjuo de Andrzej Pettyn kun d-ro A. de Salvo oni diskutis pri la informado interne de la E-movado kaj pri la rolo de Pilo-Press - En la pasintdimanĉa E-Ekspreso (19 nov) A. Pettyn starigis la demandon pri la daŭrigo de la kampanjo "Esperanto en la sporto". En la provizora kongresa programo de Beogrado oni ne trovas indikon pri ĝi. Krone la parolisto atentigas pri la fakto, ke 1974 estos la Monda Ĉampionado pri Futbalo en FRG kaj proponis utiligi tiun okazon por Esperanto en Eŭropo. Ankaŭ Pilo-Press jam pensis pri tio kaj povas informi, ke la estraro de GEA ĵus decidis, morale kaj finance subteni "futbalan kampanjon" 1974.